

Hermann Schmidt,  
Sopirplena tago

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Finiĝas tago,  
sopiras mi.  
Mi estas trista  
pro tio ĉi.

Ĉu rajtos ree  
ekvivi mi?  
Grizega estas  
ja ĉio ĉi.

Vundita estas  
nun mia kor'!  
Turmentas ege  
min la dolor'.

Sed Dio stiras  
tra ĉio min,  
la vivon gvidas  
al bona fin'.

*Traduko de la Frisa poemo "En Dai fol Lêngen" de HERMANN SCHMIDT (\*1901-11-10 – †1979-03-10) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1994.*

*MR-264-1a / Arg-65-128 (2003-10-26 01:36:35)*